jaroj inter 1961 kaj 1974 mi estis membro de BEA kaj membro kaj fakdelegito de UEA. La kulmino de mia esperantista kariero estis la honoro prelegi en la Internacia Somera Universitato en Vieno (kaj la plezuro ricevi miajn elspezojn de miaj tiamaj dungantoj!). Kompreneble, preparante mian paroladon, mi klopodis konstati la nunan staton de la movado pere de la interreto. Estis plezure trovi ĝin, en Britio kaj internacie, pli vigla ol mi atendis. Menciinda ankaŭ estas la impona

profesieco de la eldonadoj paperaj kaj elektronikaj de EAB.

El tiuj jaroj de mia aktiveco mi ankoraŭ posedas plurajn jarkolektojn de diversaj gazetoj (*Esperanto* de UEA, *British Esperantist*, *Heroldo de Esperanto*, kaj aliaj). Ĉi tiujn mi volonte donacus al historiema esperantisto por gajni iom da spaco. Kompreneble mi petus, ke la ricevonto pagu la sendkostojn. Por detaloj kontaktu: mike.falla@ukonline.co.uk.

Mike Falla

RETE KAJ LETERE

Enmigrinta renoviĝo en Irlando

Estimata redaktoro,

Eble vi scias, ke Somhairle MacGhill-Eathain (Sorley Maclean) – same kiel William Auld – estis nomumita por la Nobel-premio por literaturo. Bedaŭrinde, ambaŭ mortis kaj ne ricevis la premion.

Alia afero: mi ĵus ricevis la lastan numeron de *EAB-Update*, kaj mi legis en la aldonita raporto, ke 'Falling membership

BY LETTER AND E-MAIL

is apparent both in EAB and in the voluntary sector'. Eble la legantoj de *Update* interesiĝos scii pri la sperto de EAI (Esperanto-Asocio de Irlando).

Dum lastaj jaroj, la membraro de nia eta asocio ankaŭ konstante falis kaj pliaĝiĝis. Ĝis ĉi tiu jaro, ni timis, ke ni baldaŭ tute malaperos. Tamen, dum lastaj monatoj, subite aperis (el nenie!) homoj el eksterlando, kiuj interesiĝas pri Esperanto. Pasint-sabaton ni organizis en nia hejmo renkontiĝon de esperantistoj, kaj je nia surprizo kaj kontento venis homoj (loĝantaj en Irlando kaj vizitantoj) el Rusio, Italio, Portugalio, kune kun lokuloj el Dublino kaj Galway – entute 12 personoj. Antaŭ nelonge venis al niaj kutimaj Dublinaj renkontiĝoj homoj el Rusio, Pollando, Italio/Hispanio, Portugalio kaj juna nova esperantisto duonirlanda duonganaa.

Mia konkludo estas tio, ke se niaj Esperantaj asocioj celus, ne nur anglalingvanojn, sed ankaŭ (kaj precipe) la multajn homojn el aliaj landoj de la Eŭropa Unio kaj ekster ĝi, kiuj nun venas al niaj landoj, tio povus renovigi kaj revigligi niajn asociojn.

Girvan McKay /
Garbhan MacAoidh

Polish Radio Esperanto service

Happily it seems that our protests and those of the worldwide Esperantists about the ending of the daily broadcasts have had some success! Now, instead of the radio broadcasts, there are daily 'Podcasts' which you can listen to whenever you like, provided that you have a computer with broadband and loudspeakers or headphones.

Simply go to <http://www.polskieradio.pl/eo/> and you will see the new Polish Radio Esperanto section's home page. Just click on the date (in red) to which you wish to listen, and it will start. It lasts 20 minutes, and the content is varied, and includes new and repeated interviews which are especially interesting. Start now and listen to Barbara Pietrzak's review of the spring edition of *La Brita Esperantisto* of Tuesday, 20 March!

If you would like full instructions in Esperanto on how to arrange automatic daily downloading of these podcasts to your computer, contact me at EsperantoCH45@aol.com or ian.mac.dowall@cwctv.net

Ian Mac Dowall,
20 March 2007

JEB denove la oficiala junulara fako de EAB

La membraro de JEB nun estas ĉe 57, kaj ni gajnis pli ol 12 membrojn dum majo, sed tiu nivelo baldaŭ falos, ĉar internaciaj studentoj reiras hejmen. La plimulto nun ricevas nian gazeton, sed ĝia prepara sistemo ankoraŭ ne funkcias tute glate. Ĝis nun ni faris tri numerojn, kaj ĉiu numero havis malsaman redaktanton.

Britaj gejunuloj lastatempe ĉeestis plurajn aranĝojn.



Kampara renkontiĝo en Hispanio

Mi finfine sukcesis Esperantigi amikinson Lauren! Mi klopodis

Anoj de JEB ĉe la Brita Kongreso de Esperanto en Letchworth

instrui la unuan fojon, sed tio estis pli malfacila tasko ol ŝajnus. Aŭdinte pri semajnfina aranĝo okazonta en Madrido, mi demandis al ŝi, ĉu ŝi ŝatus iri kaj surprize ŝi jesis. Tie ŝi unue multe nervoziĝis, sed poste ŝi bone amikiĝis kun la aliaj partoprenantoj. Lauren multe lernis. Ni ofte eliris al la urbcentro, kaj reirante hejmen, ŝi diris, ke ŝi ja akiris nekredible bonegajn vivdaŭrajn geamikojn eĉ dum tiel mallonga tempo.

Internacia Junulara Festivalo, Italio

Okazinte dum pasko, la festivalo estis pli trankvila por mi, pro tio, ke mi ne bezonis zorgi pri iu alia, ĉu tiu ĝuas aŭ ne. Estis pli trankvile, sed feliĉe ne malpli festeme. Ĉeestis bonaj homoj, kelkajn el kiuj mi jam renkontis.



Gaja matenmanĝo

Posteno por juna esperantisto de 18- ĝis 26-jara por la projekto 'Ekkoni Esperanton en lernejo' ĉe Eŭropa Volontula Servo

Estimataj!

La 10-an de majo 2007, nia projekto 'Ekkoni Esperanton en lernejo', estis akceptita de nia nacia Agentejo por Eŭropa Junulara Programo.

Nia oferto estas konsultebla en la angla kaj franca sur la retpaĝaro: http://ec.europa.eu/youth/program/sos/hei/hei_form_en.cfm?EID=14000557101 de la oficiala retejo de la Eŭropa Junulara Programo (unu posteno).

Ni aprezus, ke kandidatoj estu rekomenditaj de sia landa asocio, kaj ilia scio de Esperanto estu atestita de diplomo aŭ de Esperanta asocio.

Ni serĉas en EU-landoj taŭgajn kandidatojn por tiu posteno de Eŭropa Volontulo.

Dankon pro via perado al junaj esperantistoj (18–26 jaraj) koncernataj.

Kandidatoj devos turni sin al Nacia Agentejo por Eŭropa Junulara Programo de la propra lando.

Kun koraj salutoj,
Jeanne-Marie Cash (Toulouse, Francio)
Respondeca pri la projekto ĉe
Esperanto-Kultur-centro de Tuluzo

La brita nacia agentejo estas: Connect Youth Education and Training Group, The British Council, 10 Spring Gardens, London SW1A 2BN. Tel. (020) 73 89 40 30 / 33; rete: Connectyouth.enquiries@britishcouncil.org; retpaĝo: www.britcoun.org/education/connectyouth/index.

Ni situis apud la bela strando kaj la maro malvarmega. Ĉiuokaze multe sunis. Krome, la italaj manĝaĵoj pli plaĉis ol ĉe aliaj aranĝoj. Mi vizitis Venecion dum kelkaj horoj – tre bela urbo, sed, laŭ mi, se oni vidis unu ponton, oni jam vidis ĉiujn! El Britio partoprenis ankaŭ Gabriel Corsetti.

Brita Kongreso, Letchworth

Alta nombro da gejunuloj venis verŝajne pro la proksimeco al la ĉefurbo; estis la samaj vizaĝoj, kelkaj novuloj, kelkaj internaciaj. Ni ĵus finis numeron 3 de nia gazeto, kiun ni vendis por allogi patronojn, kaj tie ni gajnis unu-du novajn membrojn. Neniu ŝatis la loĝejon menditan, sed mi multe ŝatis la kongreson. Prelegoj kaj la kantisto JoMo interesis. Bonaspekta kaj bone malgranda estis la urbo, sed ni pli ofte troviĝis ene de trinkejo ol ekstere – nur pro la ebleco praktiki pli da Esperanto, kompreneble.

Jarkunsido de JEB

Ni voĉdonis denove iĝi la oficiala junulara fako de EAB, kaj ni akceptos kiel membron ĉiun, kiu havas malpli ol 30 jarojn. La

En Italio. Maldekstre: Daniel White, rekonebla per la bierskatolo



En Madrido

sama komitato elektigis kiel antaŭe, kun la aldono de Clare Hunter. Tim Owen restas la prezidanto, kaj mi estas la sekretario.

Ni esperas organizi propran JEBan aranĝon dum la venonta somero, finfine fari JEBan flugfolion kaj prepari por la venonta 'Course-You-Can (Speak Esperanto)' en Barlastono.

Daniel White

Junularo Esperantista Brita / Association for Young Esperantists. Join for free / Anyone under 30. Online at www.novajeb.org.uk; e-mail: jeb@novajeb.org.uk.



RETE KAJ LETERE

Correction to library history

Dear Editor,

I was bemused by the account of my role in the Butler library (*EAB-Update* 35, p.12). For the record, I was not the Association's librarian, I did *not* begin work on an author catalogue, I did *not* start a lending collection, and I did *not* resign ...

In the early 1970s I compiled a "union catalogue" of Esperanto books in British public libraries, so that they could be borrowed through the interlibrary lending system. Cecil Capp and I also explored other forms of co-operation with the National Central Library (now part of the British Library), put out feelers to various funding agencies, etc. One of our conclusions was that Butler's idiosyncratic catalogue was a serious obstacle to making the collection more widely used.

In the mid-70s, when the Association became concerned about the long-term viability of its inner-London headquarters and was considering alternative provincial locations, my partner and I offered to provide accommodation for the library in

Clapham, south London. This would ensure that the collection remained available to researchers in London, and would also facilitate the re-cataloguing project, including eventual computerisation. We undertook to fund the entire operation, including the provision of premises, from our own resources.

We put this offer to the Association's then president. He replied that the proposal made him "laugh out loud". Quite so ...

Dermod Quirke



'Contradiction' in book and film *Gerda malaperis!*

Dear Editor,

I have had some correspondence with Claude Piron about the 'contradiction' at the end of *Gerda malaperis!* With his agreement, I would be grateful if you could put the following 'PS' to my review (No. 36, p. 11) of the film in the next edition of *EAB-Ĝisdate*:

'Fakte, estas multe da kontraŭdiroj en la rakonto, kiel mi eltrovis de la verkisto! Kompreneble, estas bone vidi la filmon (aŭ legi la rakonton) plifoj, do ŝajnas ĝuste al mi doni al la spektantoj (aŭ legantoj) konsileton: la kontraŭdiro, intencita de Piron, temas pri Gerda, ne pri la trezoro aŭ la du knaboj (kiel mi pensis). Oni trovos ĝin kaj en la filmo kaj en la libro.'

Miland Joshi



Korespondi deziras el Jordanio

Karaj geamikoj,

Mi estas viro 38-jara. Mi loĝas en Jordanio kaj serĉas novajn amikojn tra la tuta mondo. Mi deziras praktiki la lingvon por

povi flue paroli ĝin.

Mi atendas vian respondon kun plezuro.

Abdel Karim, P.O. Box 230671, Amman - 11123, Jordanio (karimo@walla.com)



Turismo dum Brazila Kongreso de Esperanto

Estimata samideano,

Mi estas Rosana Peixoto Carames el Rio-de-Ĵaneiro, Brazilo. Mi partoprenas en la Loka Organiza Komitato de la 42-a Brazila Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 8-a ĝis la 13-a de julio 2007 en nia urbo. La temo estas 'Cent Jaroj de Esperanto-Movado en Brazilo – Strategioj por la Estonteco'. Por

pliaj informoj bv. eniri la paĝon de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro: www.aerj.org.br.

Mi gvidos rondan tablon pri turismo. La kialo de ĉi tiu letero estas peti vian helpon pri la temo Turismo. Por riĉigi nian kunvenon kun informoj pri viaj spertoj pri turismo kaj Esperanto en via urbo, via lando, kaj eksterlanden, bv. diri, de kiu urbo kaj lando vi estas. La informojn kaj ideojn pri kiaj strategioj adopti por antaŭenigi kaj disvastigi turismon pere de Esperanto oni debatos inter ni, kaj post la kongreso mi sendos al vi la koncernan raporton. Tiamaniere ni havas garantion pri via partopreno en nia kongreso, eĉ se vi eble ne ĉestos.

Rosana P. Carames
rosanarioesperanto@yahoo.com.br

MALLONGE

IN SHORT

• **'Infanoj el ĉiuj landoj: Unuiĝu!'** Infangrupo 'Esperanto' de la Socikultura Centro (CSC) en la franca urbeto Quétigny kreis propran ttt-ejon <<http://biro.daniel.club.fr/index.html>>. Quétigny havas preskau 10 000 loĝantojn kaj situas oriente de Dijon.

La ideon krei la retpaĝaron havis la infanoj mem. La gvidantoj tuj decidis helpi la infanojn kaj ĝin realigi per redaktado de la paĝoj, cifereca fotado, enretigo ktp.

Jen bela infana iniciato, kiu indas je kuraĝigoj el la tuta mondo por la infanoj mem kaj por la gvidantoj, kiuj ebligis al ili ĝin efektiviĝi. La ret-adreso de la klubo estas: quetigny-esperanto@club-internet.fr. Ili aldonis la devizon 'Infanoj el ĉiuj landoj: Unuiĝu!'

• **Esperanto in *Living Orkney*** The June issue of the magazine *Living Orkney* printed a four-page article on Esperanto featuring

Kirkwallian Sandy Windwick, together with photos.

• **Kontribuajoj petataj por ĉina rubriko 'Esperanto kunligas nin'** La 26-an de julio 2007 estos la 120-a datreveno de la naskiĝo de Esperanto. Omaĝe al tio la redakcio de la reta gazeto 'El Popola Ĉinio' lanĉos rubrikon 'Esperanto kunligas nin' en sia retpaĝaro ĉe www.chinareport.com.cn/ kaj petas viajn kontribuojn.

Kontribuajoj povas esti en iu ajn formo, temante pri Esperanto-agado, pri viaj kontaktoj kun ĉinaj samideanoj, vojaĝo en Ĉinio, impresoj pri Ĉinio kaj pri 'El Popola Ĉinio'.

Estos tre bonvenaj fotoj pri diversaj agadoj kaj portreto de la aŭtoro. Oni aljuĝos premiojn, kaj la gajnintoj ricevos Esperanto-librojn aŭ paperan gazeton *Espero.com.cn*, kaj ĉiu kontribuanto ricevos donaceton.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn antaŭ la 31-a de julio

2007 al la adreso: El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, CN-100037 Pekino, Ĉinio; retpoŝte: elpc@china.com, bluacxielo@163.com.

• Foto-interesitoj

Delegito de UEA en Ĉinio kaj aktiva esperantisto s-ro Sun Minghiao planas unuigi la esperantistojn, kiuj interesiĝas pri fotado, kaj fondi Internacian Esperantistan Foto-Asocion. Interesitoj bonvolu sin turni al lia ret-adreso: semio@163.com.

• Tutmonda Festivalo de la Tero

Esperanto jam trovis naturan lokon en ĉi tiu festivalo, kies himno estas ĝuste en la Internacia Lingvo. Tio konstateblas per vizito per funkciigo de komputila laŭparolilo ĉe www.festivaldelaterre.org.

En 2007, la Tutmonda Festivalo de la Tero okazos de la 18-a ĝis la 24-a de junio en diversaj lokoj de la mondo kun la temo: 'La Solidarecoj'. Inicijatoj

estas ĝis nun anoncigitaj en pli ol 30 landoj de la kvin kontinentoj. En 2006 estis nur 25 landoj, kaj 200 asocioj. La celoj de la festivalo estas ŝirmado de la planedo, interpopolaj solidareco kaj paco.

Invititaj partopreni estas ne nur unuopuloj sed ankaŭ asocioj, lernejoj, universitatoj, fondaĵoj, kolektivoj, entreprenoj ks. Grupo da esperantistaj aktivuloj strebas kunordigi Esperantan agadon (Jeanne-Marie Cash tradukas la ĉarton, kiu aperos en la oficiala ttt-ejo). En Esperanto kaj en la franca, interesitoj sin turnu al Émile Mas: espergala@wanadoo.fr. Tel. 33 (0)1 08 75 20 71 95.

En Francio, tiu festivalo ricevas moralan subtenon de famuloj, i.a. de la genetikisto prof. Albert Jacquard, de la agrokologo kaj verkisto Pierre Rabhi, de la prezidanto de 'France en Action', Jean-Marc Governatori, de la filozofo kaj sociologo Edgar Morin (ĉiuj favoraj al Esperanto), de la ekologo Jean Marie Pelt, de la eksministriro pri la medio Corinne Lepage k.a. Subteno estos bonvena ankaŭ per tradukoj al diversaj lingvoj.

• Ĉe argentina lernejo por malavantaĝuloj

Laŭ informo de Marcelo Casartelli, la retpaĝo de Municipa Lernejo 'José C. Paz', en provinco Buenos Aires, Argentino, nun havas resumon en Esperanto. La celo de la lernejo estas instrui lingvojn kaj metiojn al malriĉuloj kaj handikapitoj. La direktoro, Carlos Víctor Zalazar, lernis Esperanton antaŭ multaj jaroj. La aldono de tiu resumeo estas kontribuo por la disvastigo de Esperanto en Argentino. La paĝaro estas: www.emfp402.com.ar. Bonvolu klaki sur 'Historia', kaj poste sur 'Otroj idiomaj' (Aliaj lingvoj). Sendu volonte dankan kaj gratulan mesaĝon al la urbestro kaj al s-ro Zalazar per la sekva retadreso: cavizar@hotmail.com.

Lord of the Rings in Esperanto

The first edition of *The Lord of the Rings* sold out in record time. Now, Sezonoj, the Russian publishing house, which also produces *La Ondo de Esperanto*, plans to publish a second edition soon.

If EAB gets enough advance orders, we will be able to place a bigger order for this second edition and get a better discount to pass on to you, our customers. The full cost for the 3-volume set will be £51 plus postage and packing. If we have enough pre-orders we could sell for £47.50 plus p.&p.

Please send your order by phone (0845 230 1887), letter or e-mail (eab@esperanto-gb.org) to Esperanto House, Barlaston.

Legacies

The Association has received legacies from the estates of

- Cyril George Love, £100
- Margaret Tressider, £500
- Annette Sandford Timewell, £19,698.49
- Eric McCanlis £3,500

Donations

Two separate anonymous donations of £500 have been received this year, one of which is specifically for education. Our thanks go to those generous members, with assurance that the money will be well used.

Gift Aid

£1,279 was reclaimed in April 2007 plus £245 on a legacy. Thanks to all who participate in this scheme. Lower levels of Income Tax will bring about a reduction in the claim after 6 April 2008 for all charities.

UEA donations

EAB can transfer gifts of money to UEA to any of their specified funds, and several people have used this service recently.

• Konkurso de mallongaj filmoj

Triesta Esperanto-Asocio anoncias duan internacian konkurson pri kurtfilmoj. La filmo devas esti en formo de DVD aŭ VHS kaj ne superi 15-minutan daŭron. La limdato por alveno estas la 15-a de decembro. Pliaj informoj pri la kondiĉoj haveblas de: Esperanto Trieste, C.P.601 Trieste Centro, IT-34101 Trieste, Italio; retpoŝte: nored@tisca.inet.it; retpaĝaro: www.blog.ialweb.it/esperantotrieste.

• Prelegoj pri Nepalo

Dank' al Germana Esperanto-Asocio kaj ties nova komisiito por rondvojaĝoj, organiziĝis rondvojaĝo de nepala Esperanto-instruisto. La vojaĝplano iris tra diversaj urboj en Germanio. La aktiva Esperanto-instruisto kaj sekretario de Nepala Esperanto-Asocio Bharat Kumar Ghimire el Katmanduo restadis en la nova

Esperanto-urbo Herzberg, vizitis la pri-Esperantan ekspozicion en la urba biblioteko, salutis la urbestron Gerhard Walter kaj plurloke varbis por Esperanto. Dum lia dutaga vizito en Herzberg, li prelegis entute kvarfoje sub la temo 'Nepalo – krono de la mondo' pri sia hejmlando kaj la tiea Esperanto-movado, ekzemple en la loka gimnazio kaj al popolaltlernejaj grupoj. Ankaŭ la regiona gazetaro antaŭanoncis la prelegon kaj poste denove raportos pri ĝi. Dum pluraj jaroj EAB sensukcese serĉadis personon pretan organizi tiajn neoftajn rondvojaĝojn. Se vi pretus, bonvolu anonci vin al la EAB-oficejo.

• Biblioteka kolokvo en oktobro en Vieno

La 19-an kaj 20-an de oktobro 2007 en Vieno okazos la Aŭstria Nacia Biblioteka Kolokvo pri Esperanto-bibliotekoj kaj arkivoj. Ĝi funkcios sub teknike bonaj kondiĉoj en la nova sidejo de la Esperanto-muzeo.

La celo de la kolokvo estas prezenti la ĉefajn, solvendajn problemojn, kiujn frontas divers-tipaj planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj. La programo inkluzivos i) prezenton de la aktuala situacio de la Esperanto-muzeo kaj la kolekto; ii) informojn pri gravaj bibliotekoj kaj arkivoj; iii)

utiligon kaj diskonigon de la riĉaĵoj de la kolektoj; iv) problemojn de modernigo i.a. per uzo de novaj teknologioj.

Pliaj informoj haveblas de: Internacia Esperanto-muzeo, Palais Mollard, Herrengasse 9, A-1010 Wien, Aŭstrio. Tel. (+43 1) 53 410 / 731 (730); retroŝte: herbert.mayer@onb.ac.at; www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.

• **Socia forumo sen lingvaj baroj**
La 80-a SAT-kongreso okazos en Antony (suda Pariza ĉirkaŭurbo) de la 21-a ĝis 28-a de julio 2007. Oni promesas allogan soci-kulturaran programon. Pliaj informoj ĉe: www.satesperanto.org/-SAT-Kongreso-2007-Parizo.

• Pledo por Esperanto

La 15-an de majo aperis pledo por Esperanto en la franca maldekstra reta gazeto *Respublica*: www.gaucherepublicaine.org/article,1349 ..._La-nation-un-concept-republicain-egalite-des-droits-communautaires-et-communautarisme-langue-nationale-et-autres-suite-nd12 aŭ mallonge: minilien.fr/a0kcdh. La aŭtoro, Valentin Boudras-Chapon, enkondukas sian pledon por Esperanto per kritiko de 'la kreskanta hegemonio de la angla, efika vehiklo de la penetrado de la tutmondaj financaj fortoj por

Obituaries

We have heard that **Hilda Tharme** of Bognor passed away on 24 April 2007, aged 85. She was for many years the Welsh Regional Secretary of the Society of British Esperanto Teachers.

Dorothea England of Letchworth died in April, aged 96. Her father was Russell Scott. She leaves two sons, Roland and Tristram England, who both speak Esperanto.

John Rapley mortis en Wissembourg, Alzaco, la 9-an de junio, dek tagojn antaŭ sia 80-a datreveno. Li suferis de hepata kancero malfrue diagnozita kaj mem decidis kontraŭ kemioterapio. Okazis kvieta ceremonio kaj kremacio. Helga Rapley

EAB-Ĝisdate aŭ La Brita Esperantisto *volonte aperigus pli longan nekrologon pri Johano Rapley, kiu dum multaj jaroj kontribuis al la laboro kaj de BEA kaj de UEA, kaj en Britio, kie UEA antaŭe havis sian sidejon, kaj en Nederlando.*

Membership News

New Members

Lorna Davies, Malvern
A.U. MacCalium, Glasgow

Completed the Free Postal Course

Merle Adams, Great Dunmow

Deceased

John Rapley, Wissembourg, FR.
R. Stockbridge, Westerham

la komunikado de la elitoj kaj la disvastigo de la konoj (kaj sekve favoranta la progresivan submetadon de la popoloj malbone regantaj tiun ilon)', kaj, aliflanke, de la obstaklo, 'kiun konsistigas la praktikado de dudeko da oficialaj lingvoj en Eŭropo por konstrui politikan enton, havanta sumon da penso facile komunik-eblan inter ĉiuj kaj kapablan pro tio kontraŭstari al la detrua penetrado de la tutmonda 'turbokapitalismo'. Lia pledo por Esperanto montras, ke li estas bone informita pri la Internacia Lingvo.

• Turismi ĉe Havro, Francio

Informis Havra Esperantista Grupo, ke ĝi havas retpaĝaron pri 'Turismo kaj Esperanto' ĉe www.gvidilo.org, kiun eblas konsulti, se vi deziras ferii en norda Francio.

• Sir Ebenezer gets Esperanto on TV

Jonathan Meades spoke a couple of sentences in Esperanto on the evening of 30 May in his 'Abroad Again' programme on BBC2 when describing the history of Letchworth Garden City and the activities that took place there. The word Esperanto appeared quite large on the screen when he was introducing the subject. The city's founder was Esperantist Sir Ebenezer Howard.

• Blogo pri rusaj filmoj esperantigitaj

Rusa blogo pri malnovaj rusaj filmoj Esperante subtekstigitaj: <http://kinejo.blogspot.com/>. □

Course-you-can (speak Esperanto)!

– an Esperanto course for beginners and post-beginners

19–21 October 2007 at Wedgwood Memorial College, Barlaston, Staffordshire

A joint initiative between EAB and Wedgwood Memorial College

This specially arranged course will help you read, write and speak Esperanto. We cordially invite all beginners and post-beginners and particularly Free Postal Course learners to attend and take advantage of the opportunity to practise speaking and learning in an Esperanto atmosphere.

While there, take time to visit the on-site Esperanto Centre, meet our staff, pursue the Esperanto library shelves and buy from our range of new and second-hand books.

Our weekend starts at 17:00 on the Friday with registration before dinner at 18:30. However, if you cannot make it Friday night, please come and join us on Saturday morning. We will be pleased to see you, and prices will be adjusted accordingly.

We will finish after a short after-lunch session on Sunday.

FEES *Single bedroom* £91 *Shared bedroom* £83 *Non-resident* £61

En-suite: single room for the weekend £10 extra; shared room for the weekend £16 extra (per room).

Please note that en-suite bedrooms are allocated on a first-request-first-served basis. Do not, therefore, pay the en-suite supplement in advance.

The college is well known for its good food – vegetarians and special diets catered for.

- Ask for an enrolment form from: Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887; e-mail: eab@esperanto-gb.org.
- Check out our education website: www.esperantoeducation.co.uk
- All Free Postal Course learners who complete the 12-lesson course this year and wish to attend will be entitled to a subsidy by EAB.

Lingvo kaj popolo: Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado de Humphrey Tonkin

Ĉi tiu verko ekestis kiel prelegaro por la Interlingvistikaj Studoj ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznano. Ĝi estas inventaro kaj kritika ekzameno de la spertoj, kiujn prof. Tonkin akiris dum sia pli ol 50-jara aktivado por Esperanto. Ĝia celo estas demandosigni kelkajn ricevitajn ideojn pri Esperanto kaj esperantismo, survoje al pli profunda pridemandado de nia movado, nia kulturo kaj niaj labormetodoj.

Prof. Humphrey Tonkin estas la plej elstara gvidanto de la Esperanto-movado de la lastaj jardekoj, i.a. prezidanto de TEJO (1969–71) kaj de UEA (1974–80, 1986–9).

Humphrey Tonkin: *Lingvo kaj popolo: Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado*. Roterdamo [NL]: Universala Esperanto-Asocio, 2006. 159p. 21x15cm. ISBN 92-9017-093-X.

- **Mendu ĉe EAB** kontraŭ £11,24 (inkl. de afranko kaj pakado). Tel. 0845 230 1887 aŭ mendu interrete pere de la retpaĝaro de EAB: www.esperanto-gb.org

